# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 12 Decembro, 2017

*Kara Leganto, proksimiĝas al sia fino la jaro 2017-a. Do, kion ĝi alportis al nia E-societo de Ŝikago? Bedaŭrinde, foriris ekster Ŝikagio vikario Hanso. Sed alvenis multaj spertaj E-istoj. Do, venis tempo de elekto: bv proponi vian kandidatecon por la estraro de la E-Societo de Ŝikago. La estraro mem, post longaj diskutoj, proponis por la prezidanta posteno samideanon d-ron Eric. Oni balotu la 17an de Decembro 2017. Nepre venu. Rajtas elekti NUR membroj de la ESdŜ.*

*La 15a de Decembro estas ne nur Zamenhofa Tago, sed ankaŭ – tago de la E-libro. Nia multjara leganto P. S. Viana el Brazilio – kuracisto, E-verkisto kaj tradukisto, proponas artikolon pri la legado kaj recenzon de la E-libro. Ankaŭ – inform de Araneo. Dankon al ĉiuj kontribuintoj!*

*Ĝis la revido dum la Zamenhofa tago kaj* **Feliĉajn Feriojn!** –Viktoro-Redaktoro

## Zamenhofa Tago'2017

La Zamenhofa Festo okazos dimanĉe, la 17an de Decembro 2017, inter tagmezo kaj 4 ptm en **Ronald Williams Library** laŭ la adreso: 5500 Saint Louis Ave., Chicago, IL 60625. La loko, situanta en la mezo de NEIU kampuso apud Bohemia Tombejo inter stratoj de N. Pulaski, Foster, Bryn Mawr kaj St. Louis, estas atingebla per bus-itineroj n-roj 53, 82, 92. Apudas *Kimball* stacio de *Bruna Linio*. Parkejo estas senpaga. $20 de persono. Estos inaŭrigita super-kvalita ekspozicio omaĝe al 100-jara datreveno de nia Majstro forpaso.

## Dankesprimo *de Hans Becklin*

***La lingvo, kiun mi iam elektis***
***en bonan komunumon koron plektis.***
***Do danko lirlas el profunda fonto***
***kun forto grimpas ĝi al pint' de monto***
***sur kiu iam hisis la standardon***
***la samaj, kiuj hejme lasis ardon***
***al lando sia aŭ al sia gento.***
***Troviĝis post la laso nova sento***
***venante vente al la borda urbo***
***por festi finon de la lingv-perturbo.***
***Al ĉiu, kies koro dankas same***
***ligitaj estu ni, kaj porĉiame.***

## Ni Devus Legi Pli Multe *de Paŭlo Sergio Viana (Brazilio)*



Kiam oni pensas pri la plej grava inventaĵo en la historio de la homaro, oni tuj pensas pri la rado. Mi pensas pri lingvo en skriba formo. Ĉu vi povas imagi la mondon sen tekstoj?


Eble la plej antikva skribaĵo estas la Epopeo de Gilgamesh. La argilaj objektoj kiuj enhavas mitologian rakonton pri homo, kiu defiis la diojn, estis faritaj ĉirkaŭ 2000 jarojn A.K. Dum 4000 jaroj la homoj skribas, senĉese. Certe tio estas grava fenomeno, ĉu ne?

Jam de longa tempo oni elstarigas la efikon kaj valoron de legado por la mensa sano. Novaĵo estas, ke lastatempe neŭrologiaj esploroj pli kaj pli detale montras la manieron, kiel la cerbo reagas dum legado. Ĝi funkcias ja kiel komplika, multfaceta ekzerco, kiu tenas la cerbon aktiva kaj lerta. Lastatempaj sciencaj esploroj montras, ke ni devas legi pli multe, por nia propra bono.

Kiam oni legas, certa kvanto da cerbaj procezoj aktiviĝas: perceptado, memoro kaj rezonado. Aktivas precipe la maldekstra duono de cerbo, kiu respondas pri lingvokapablo kaj analizokapablo. Sed la tuta cerbo laboras. Dekodigado de literoj, vortoj kaj frazoj estas plenumata de la cerba kortekso; la okcipita kaj tempia regionoj rekonas la signifon de vortoj; la frunta regiono funkcias por la sono de vortoj; hipokampo kaj la meztempia regionoj uziĝas por elvokado de memoroj; rakontoj kaj emociaj enhavoj aktivigas la cerbajn migdalojn kaj aliajn emociofunkciajn lokojn; rezonado pri la legata materialo koncernas la postfruntan kortekson.

Tia multflanka cerba laboro plibonigas la rekonkapablon kaj la inteligentecon. El la Universitato de Toronto, en Kanado, studaĵo montris, ke aparte utila estas legado de fikciaj tekstoj. Tia literaturo estas speco de scenigo, en kiu la leganto mem kvazaŭ interagas. Tiaj tekstoj pritraktas homajn mensojn kaj faras, ke legantoj plibonigu sian kunsentemon kaj komprenemon rilate aliajn homojn. Modernaj aparatoj montras, ke specialaj regionoj en la cerbo, ligitaj ☞

al emocioj, aktiviĝas. Inter aliaj bonaj rezultoj, legado de fikciaĵoj povas ekzemple malpliigi antaŭjuĝojn kontraŭ aliaj homoj.



Legado influas ankaŭ en la konservado de rememoroj, kiuj funkcias kiel veraj travivaĵoj.

Ankaŭ legado de poemoj estas tre stimula, precipe kiel ekzerco pri subjektiveco kaj interpretado de simboloj.

Resume, la kutimo legi estas fakte tre saniga por la menso. Ĝi devas komenciĝi en la infana aĝo. Kaj maljunaj homoj devas zorgi pri siaj okuloj, por ke tiu plezuro daŭru kiel eble plej longe. Ĉiam estas tempo por novaj pensoj kaj lernado.

Feliĉe, vasta stoko da bonegaj libroj en Esperanto estas disponebla. Cetere, ekzistas interesa programo en Esperantujo, kiu rilatas al legado de libroj kaj meritas ĉies atenton: la Esperanto-Sumoo, iniciatita de la japano Hori Jasuo. Vizitu la retejon:

http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl

## Ĉarma Libro, Agrabla Legaĵo

Okaze de via proksima libertempo, kiam vi pasigos kelkajn tagojn sur plaĝo, kuŝante sub agrabla suno, tiam nepre memoru alporti libron. Ĝi estu facila, milda, bontona teksto por ripozigo de via spirito. Por tio, mi rekomendas al vi: pensu pri "Lito apud la fenestro", de Betty Salt (eldono UEA, 1999).

Vi havos en la mano tre simpatian volumeton. Ĝi konsistas el etaj rakontoj, poemoj, teatraĵetoj, tradukaĵoj. Pri la aŭtorino (1907-1994), iama aktiva Esperantisto en la kanada movado, oni skribis, ke ŝi estis mecenato por UEA kaj ĝia Honora Membro. Supozeble, la eldono estis esprimo de danko, flanke de la asocio.

La plej granda merito de la libro estas la stilo de la aŭtorino: flua, pura, ĝusta, nuancoplena – kaj precipe facila. Mi riskus aserti, ke eĉ komencanto, kun helpo de vortaro, povus legi ĝin. Kaj nuntempe, kiam iuj verkistoj preferas komplikajn frazkonstruojn kaj amason da neologismoj – kaj nomas tion "moderna stilo" – estas vera plezuro legi la tekstojn de Salt. Al mi ŝajnas, ke ŝi fidele sekvis la Zamenhofan tradicion.

La enhavo mem de la diversaj, nelongaj tekstoj estas foje edifa, foje naiva, foje amuza, foje lirika. Elstaras la amo al la bela Kanado. Unu el la rakontoj, pri tri fratinoj kaj unu kuracisto, estas vere amuza: unu el la fratinoj ricevas vundon je la postaĵo sed hontas montri tiun korpoparton al la doktoro. Ĉu vi povus diveni, kion ŝi faris por solvi la problemon?

Resume: jen libreto, kiu denove montras, ke literaturo estas eliksiro, kiu bonfaras al la animo. Kaj por tio, ĝi ne devas aspekti komplike; simpleco, delikateco kaj homeco sufiĉas. *–Paŭlo Sergio Viana*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

**17-an de Decembro** – Zamenhofa Tago (vd informon supre)

**23-an de Januaro** – 85-datreveno de Holodomoro en Ukrainio (gvidas Araneo)

**20-an de Febuaro** – Vintraj Olimpikaj ludoj (Puramo Ĉong)

**27-an de Marto** – temo estos anoncata

## "A Story of Hope: A Holocaust Story"

En mia mano mi tenas la libron kun kortushita titolo "La Espero". Jes, mi (kaj vi) ne erasis "The Hope". Aŭtoro, Aleksandro Ruckij, priskribas sian vivon de la patrino, Zofia, ankaŭ – ŝian vivon dum kaj post Auschwitz-koncentrejo. Ankaŭ Ruckij priskribis la vivon de L. L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kies tri infanoj pereis en la manoj de naziistoj dum la II Mondmilito.

Aleksandro, duon-judo-ukraino, kredas, ke Esperanto, kiel "universala Lingvo", helpos preventi multajn konfliktojn kaj sociajn malpacojn, prezentataj hodiaŭ.

Aleksandro, per "A Story by Hope" (ISBN: 978-1-4525-2792-5 aŭ- 2), nun dediĉas sian propran tempon por verki historian de la Patrino…

## E-Rakonto *de Viktoro-Redaktoro*



*Barry Friedman, samideano, agrable sendis al ni sian rakonton (vd alkroĉaĵon), kie li sinprezentis: mia urbo estas Columbus, mia ŝtato estas Ohio, mia lando estas Usono. Do, bv sendi al la redakcio de "Saluton" viajn rimarkojn kaj bildojn, ni planas aperigi ĉion. Bv noti – "por konkurso".*

*Koran dankon.*